

Bona Espero



Cirkulero 70

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r. a.

Julio 2009

prezidanto: Bernd Schönberner ★ Am Krähenberg 30 ★ D-59872 Meschede

☎ +49-(0) 291-82552 ★ 📧 schoenberner.bernd@t-online.de

Karaj amikoj kaj subtenantoj,

je la 6a de junio 2009 dum la ĉefkunveno oni devis elekti novan estraron, ĉar nia kara prezidanto Otto Nelken pro sanaj kialoj ne plu povas praktiki tiun ĉi oficon. (bv. legi suben ankaŭ la dankvortojn de Otto). Dum la kunveno mi dankis lin kore pro sia laboro.

La foto montras la novan estraron:

De maldekstre: Eckhard Stoll (vicprezidanto), Dagmar Rahn (kasistino), Bernd Schönberner (prezidanto), Uschi Teuteberg-Nelken (sekretariino)



„Karaj geamikoj, post 11 jaroj funkcio en la ofico kiel prezidanto mi bedaŭregas, devi demisii, ne nur, ĉar intertempe mi havas 75 jarojn, sed antaŭ ĉio pro gravaj sanaj kialoj. Ĉi tio estas tre malfacila por mi, tial ke la laboro kun vi same kiel miaj estraranoj, ĉiuj kunlaborantoj de Bona Espero kaj per tio la sukcesaj rezultoj de la aktiveco de ĉiuj kunkune por „niaj“ infanoj ĉiam denove ĝojigis min kaj signifis por mi fravegan motivon. Por tio mi ŝatas danki vin ĉiujn tutkore, deziras al vi ĉion bonan ĉiurilate kaj petas vin, daŭrigi vian fidelan, grandaniman, tre necesan subtenon same sub mia amiko kaj posteulo Bernd Schönberner. Via Otto Nelken “

Ursula Grattapaglia skribis el Brazilo:

“Karaj geamikoj! Nova jaro – nova faro!

Jen por vi kelkaj informoj por konstati kiel via helpo prosperigas nian laboron.

Nia instruistino Maria Rodrigues, kiu estis lernantino en la okdekaj jaroj, edziniĝis kaj havis du knabinojn, dum pli ol dek jaroj ŝi lecionis en urba lernejo kaj de 3 jaroj ŝi nun instruas kaj zorgas ekster la lernejaj horoj

donacokonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede
(BLZ / bankkodo 464 510 12)

kasistino:

Dagmar Rahn ✉ Hirschfeldstr. 3 ✉ D-59581 Warstein
☎ +49-(0)2902-700330, 📠 +49-(0)2902-700328
📧 dagmar@rahn76.de

plurajn infanojn en Bona Espero. Dume ŝi finis siajn studojn de pedagogio en la universitato de Formosa, kien ŝi veturis kun aliaj 15 instruistinoj dum la semajnfinoj. Tiu bela programo, pagita de la ŝtato permesas al instruistinoj, kiuj nur havis duagradan instruon, akiri pli altan eduknivelon.

Post la baza universitata kurso ek de februaro ŝi kaj Adarci komencis magistrigan kurson de psikopedagogio en "universitato je distanco", vaste uzata sistemo en Brazilo por ebligi studojn je universitata nivelo al homoj en foraj regionoj.

Same Amanda, jam edzino kaj patrino komencis nun pedagogian kurson en la sama sistemo de "instruado je distanco" – unufoje monate venas la profesoroj dum semajnfino kaj faras ekzamenojn. Dume rete la studentoj povas lerni kaj klarigi dubojn.

Same kiel aliaj eksbonesperanoj (Clarimundo, ties edzino Riviane, Cassius, Rodrigo, Sergio), Adão laboras, en la televida entrepreno de nia estrarano Ulisses Riedel, kaj lastjare edziĝis al Rosangela, bela fratino de kolego, kaj nun iĝis feliĉa patro de ĉarma knabineto.

La aro de genepoj de Bona Espero daŭre kreskas! Jen kaj jen okazas ke iuj telefonas por doni siajn salutojn de eksa infano kaj nuna sukcesa civitano, kiel Silvano, Edith, Wellington, Washington, Betânia, Luciano, Zezinho, Rafael ktp.

Kio pri la nunaj infanoj ?



La nova lernojaro komenciĝis en februaro kun 24 infanoj el kiuj 14 daŭre loĝas en Bona Espero kaj 10 alvenas ĉiutage el apudaj bienoj per aŭtobuso disponigita de la urbestro de Alto Paraíso. Grandparte la gelernantoj estas novaj kandidatoj al alfabetigo senditaj kiel kutime de la juĝistaj instancoj de nia regiono. Tamen Jade, ŝia frato Carlos Eduardo kaj Luciano jam veturas ĉiutage al la

urba lernejo por frekventi la 7an klason, per la sama aŭtobuso, kiu alportas la etulojn de la apudaj bienoj.

Multaj inter la pasintjaraj infanoj, iris hejmen por la finjaraj ferioj kaj ne plu revenis. Kiel kelkfoje okazas, iliaj familiaj situacioj iom pliboniĝis kaj sub observado de la Infanprotektaj Konsilioj de la diversaj urbetoj, ili frekventas normalajn lernejojn. Tio faciligas nian laboron, ĉar la nove alvenintaj estas precipe etaj infanoj inter 5 kaj 7 jaraj kiuj ankoraŭ ne havas danĝerajn kutimojn aŭ tro detruajn vivspertojn, krom kelkaj familiaj perfortoj pro alkoholo. Niaj instruistinoj Ada kaj Maria plenumas la defion alfabetigi ilin kaj samtempe klopodi por ke ili forgesu la antaŭajn malfeliĉajn spertojn.

La plej laste alveninta bonesperano estas André, kiun nia kuiristino Maria naskis antaŭ kelkaj semajnoj!

La Volontuloj

Ek de septembro pasintjare volontulas en Bona Espero daŭre kaj entuziasme la italo Riccardo Biagi. Anstataŭ aĉeti bienon kaj planti nur por si mem, li decidis investisian entuziasmon kaj pasion por agrikultura produktado en nia grundo por nutri pli abunde la bonesperanojn antaŭvide de la granda monda krizo.

Li vere sukcese, investante siajn proprajn financajn rimedojn, jam komencis rikolti grandkvante legomojn, plantante grandkvante fruktoarbojn,



kreante sistemon por akvumi la legomejon en la seka sezono. Vere promesplena nova aspekto de nia laboro!

La germanino Christin Kopitzke el Berlino zorgis la infanojn inter oktobro kaj decembro. Ek de marto restadas en Bona Espero tri francaj volontuloj : geedzoj Jean Claude kaj Helene Dubois kune kun vigla okdekokjarulino Gaby Treanton kiu instruis entuziasme al la etuloj Esperanton.

Ilia alveno koincidis kun la urĝa neceso por Ursula restadi plurajn semajnojn en Brasília por operacii la maldekstran genuon kaj poste reakirisian moveblecon per fizioterapioj. La delikata operacio por instali protezon el titano perfekte sukcesis. La tri francaj volontuloj kun bona volo kunlaboris dum nia foresto: Jean Claude helpis en la agrikulturaj taskoj, Helene deĵoris en la kuirejo kiam la kuiristino Maria devis iri al Brasília por akuŝi kaj Gaby instruis Esperanton al la novaj infanoj.

Alia franca volontulo, Charles Perdrix, alvenos baldaŭ por kunlabori en la agrikulturaj taskoj de Bona Espero.

La politiko en Alto Paraíso

Dum la lastaj balotoj estis elektita kiel urbestro nia bona amiko Divaldo Rinco, kiu siatempe donacis al Bona Espero la terenon en Alto Paraíso kie nun staras la domo de nia urba sidejo, kie daŭre okazadas kulturaj eventoj, renkontiĝoj, edziĝoj kaj kie dormas de tempo al tempo bonesperanoj en kazo de neceso. Ni multe fidis je la helpo de la nova urbestro por solvi nian komunikan problemon per instalo de interreto en la bieno.

Ankaŭ la vic-urbestro Alan Pereira kaj la urbaj konsilistoj favore agnoskas nian Institucion, interalie ĉar kvin bonesperanoj aktive kunlaboras en la loka Rotaria Klubo kiu notinde helpas la progreson de la urbo per humanitaraj projektoj, ĉefe en la hospitalo per multekostaj aparatoj, kiujn ni sukcesis akiri per helpo de rotariaj kluboj, kie membras esperantistoj-rotarianoj (Aŭstralio, Belgio, Francio, Anglio ktp.).

La nova juĝisto de Alto Paraíso daŭrigas la favoran sintenon kiun lia antaŭulo montris por Bona Espero. Jam kelkfoje okazis ke li kondamnis

aŭtorojn de malgravaj krimoj pagi difinitan monpunon al la konto de Bona Espero !

Nia projekto "Plantu arbon " prosperas

El la 500 frukt-arbidoj plantitaj pasintjare, pli ol 450 pretervivis la sekan sezonon kaj notinde prosperis dum la pluva. Ĉiu arbido havas ŝildon kun la numero de la specio kaj la numero de la patrono kiu pagis 12 eŭrojn por ke ni dum kvin jaroj flegu la arbon. Temas pri notinda laboro por la bonesperanoj, tamen kompensita de la fakto ke la oficiala bulteno de UNEP, en sia franclingva eldono, speciale emfazis nian projekton kun mencio pri la rolo de Esperanto kaj foto de niaj infanoj.

Kaj konklude ni deziras akcenti nian sinceran dankon por la fidela altvalora dediĉo de la Estraro de la Subtena Asocio de Bona Espero e.V. en Germanio.

De 20 jaroj nia kara paro Petra kaj Bernd Schönberner estas la plej grandaj subtenantoj de nia laboro. En la du lernejoj kie ili lecionas, dum la magiaj spektakloj de Bernd, en la kristnaskaj bazaroj kaj en la grupo Kolping ili akiras la financajn rimedojn por aĉeti niajn necesajojn.

Same Uschi kaj Otto Nelken de pli ol dek jaroj sukcese zorgas, pliriĉigas kaj administras kompetente kaj sindediĉe la Asocion, kiun fondis antaŭ pli ol 25 jaroj la grupo de esperantistoj en Muenster!

Ni bonesperanoj estas konsciaj ke sen la harmonia kunlaboro de vi, ne estintus ebla krei la efikan strukturon de nia institucio kaj realigi ĉiaspecan helpon dum tiom da jaroj.

Ni dankas ankaŭ tute speciale al la grandaj donacantoj kiel gesinjoroj Astrid kaj Erik Mortensen, Catrien kaj Ru Bossong kaj ĉiuj aliaj, kiuj de jaroj estas parto de nia misio.

Al la venonta jara asembleo en Germanio ni deziras plenan sukceson en la certeco ke la sociaj taskoj de Bona Espero bone evoluas.

Bona Espero, 20^a de majo 2009"

Jen foto kun plenkreskuloj kaj grandaj lernantoj.

De maldekstre supren: Riccardo, Dona Maria (el kacero), Carlos Eduardo kaj Marcos (lernantoj en Alto Paraiso), Valdemar kaj Maria instrusistino Sube: Damiao edzo de Maria das Dores kun la bebo Andre, Jade ilia Filino (lernas en Alto Paraiso), Adarci kun Ana Luisa kaj Izabela.



Mi deziras al vi ĉiuj agrablajn somerajn tagojn!

Bernd Schönberner